

3. *-ivoro** „estajo, kiu karakterize nutras sin per io”: herbivoro, karnivoro, insektivoro (ĉiuj tri jam ĉe W ŭ s t e r, la du lastaj kun signifoj: 1) *-ivoro*; 2) *-ivoreo*). Plie: fruktivoro, sangivoro, lignivoro, sterkivoro, ktp. Homo estas „divers”-*ivoro* (li ja ne manĝas ĉion!)

4) Diversaj aliaj sufiksoj devenigitaj el „latinismaj vortoj” povus esti utilaj: ekz. *-ikolo** = „estajo, kiu vivas, loĝas en”. Kelkaj tiaj sufiksoj eliras el nura biologia uzo: ekz. *-ifera**: „kiu portas, enhavas”: mamifera besto, sed orifera grundo (ne similas al „sabloza grundo”), lanifera ŝafo, rezinifera arbo.

icido: „io, kio mortigas” (jam uzita de D-ro Paul Neergaard — Somera Universitato Malmö). Ekz.: insekticido, paraziticido, herbicido, gameticida medikamento, ktp. Sed plie en la juro: „iu, kiu mortigis iun”: hom-, reĝ-, patr-, frat-, infan-, kaj ankaŭ gent-icido (prefere al: genocido).⁴⁾

III. Teknika esprimo de sekseco ĉe bestoj.

x anstataŭas radikon.

x-o 1. Vulgara nomo de grupo (raso, specio, genro, familio, ordo, klaso, filumo, ktp.).

Ekz. aligato = aligatorideo; birdo = klaso de vertebejoj.

2. Iu ajn el tiu grupo de masloj, inoj aŭ idoj).

Ekz. grego el 50 alkoj.

3. Maslo ĝenerale, reproduktiva aŭ ne, diference de ino kaj idoj.

Ekz. tigro kaj tigrino.

4. Reproduktiva maslo por kelkaj.

Ekz. koko (virkoko) kaj kapono.

5. Nereproduktiva maslo por kelkaj; (ŝajne evitinda).

Ekz. bovo kaj taŭro.

x-oĉo* (arteformita apud -ĉj- analogie al -in- apud -nj-) = „Reproduktiva maslo” (= vir-x-o, x-viro, x-maslo). Kp. x-o 4. Ekz. Taŭro estas batal-bovoĉo. Kokoĉo (F *coq*); ĉevaloĉo aŭ stalono³⁾; kaproĉo aŭ boko³⁾.

x-atro* (de la franca *-atre*, aĉsignifa. Ĝi plie memorigas la vorton: katri) = „Nereproduktiva maslo” (kastrita x-o, eks-x-viro³⁾, eksvir-x-o³⁾, eks-x-maslo). Kp. x-o 5.

Ekz. Bovatroj tiras la plugilon. Grasa kokatro aŭ kapono (F *chapon*).

x-ino Idonaskanto. Kp. x-o 2.

Ekz. bovino kun siaj bovidoj. Kokino (F *poule*); plie kokinatro (F *poularde*) estas nereproduktiva ino.

x-ido Naskito. Kp. x-o 2.

Ekz. kokido (F *poulet*).

x-eto 1. Malgranda raso ktp. (respondas al x-o 1, 2).

Ekz. ĉevaleto = ponio.

2. Juna x-o 3, 4, 5;

Ekz. koketo [pli precize: kokoĉeto (F *cochet*) kaj kokineto (F *poulette*)] kokideto (F *poussin*). Bovĉeto (F *taurillon*); bovatreto (F *bouvillon*); ktp.

¹⁾ Eugen W ŭ s t e r: Enciklopedia vortaro Esperanta-Germana (Leipzig 1923). Partoj II-III entenas la Esperantologiajn principojn (§ E „Pri la nomoj de bestoj kaj plantoj).

²⁾ Temas pri la zoologia sufikso! Ne pri la botanika *-oid-* por subfamilio.

³⁾ Menciita en „Plena Gramatiko” de Kalocsay kaj Waringhien.

⁴⁾ Tre maloportune estas ke respondaj vortoj nacilingvaj (ekz. anglaj) signifas jen — mortigon, jen — mortigulon, jen havas ambaŭ signifojn. Eble pli oportune estus doni verban karakteron al tia sufikso: insekticidi, insekticido = ago -i; insekticidajo aŭ insekticidilo; genticido; genticidantoj. (Noto de la Redaktoro).

* signas proponitajn neologismojn.

914.83 : 546.96 : 001.4 = 089.2

Sinjoro Redaktoro,

Vi demandis en „*Scienca Revuo*”, vol. 2a, nro 4a, paĝo 133, ĉu *Rutenio* povus roli kiel geografia nomo.

Laŭ mia opinio, *Rutenio* estu uzata en Esperanto ne kiel geografia nomo pro jenaj kialoj:

1e la geografia nomo *Rutenio* (*Ruthenia*) estas malnoviĝanta, ĉar la popol-politika problemo, per kiu ĉi tiu nomo estiĝis, nun estas forigita per la aligo de la koncerna teritorio al Sovet-unio.

2e la teritorio, kiu estas nomata *Rutenio* (*Ruthenia*), ne estas ekzakte difinita. Kelkfoje oni nomas tiel Ukrainion (almenaŭ en Germanio), pli ofte la okcidentan parton de Ukrainio (apartenintan al la tiama Austri-Hungaria monarkio), kaj plej ofte tiun teritorion, kiu ankaŭ nomiĝas Karpato-Rusio, kaj apartenis dum 1918-'39 al Ĉeĥoslovakio, dum 1939-'45 al Hungario kaj nuntempe al Sovet-unio.

3e ekzistas anstataŭ *Rutenio* aliaj nomoj novaj kun pli ekzaktaj signifoj: a) Ukrainio (Malgrand-Rusio); b) Okcidenta Ukrainio, Orienta Galicio; c) Karpato-Ukrainio, Karpato-Rusio. *Rutenioj* = a) ukrainoj (malgrand-rusoj); b) rusniakoj (okcident-ukrainoj). *Rutena lingvo* = ukraina lingvo.

Oni klare vidas, ke la geografia nomo *Rutenio* estas nenecesa, eĉ evitinda, kaj sekve sen ia rolo. Tial oni povas uzi la vorton *Rutenio* kiel nomo de la elemento n-ro 44, sen skrupuloj pri homonimeco kaj eventuala miskompren-ebleco.

Herbert Runtze.